

kontakto



N-ro 1
VOLUMO 6/1969

KONTAKTO-REVUO DE TEJO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta esperanto, ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra margeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Li havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn. Por la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem, kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO kaj de la redakcio. Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp.: Kontakto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando
Presisto: Drukkerij de Kennemer, Wijkerstraat 178, Velsen-Noord, post: Beverwijk, Nederlando
Teknika redaktoro: Hans Scholten

Prezoj

Abono: 8 ndl. guld. = 32 steloj (jara-bono de minimume kvar numeroj); 2,20 ndl. guld. — 9 steloj (individua numero).
Reklamtarifo: 200 ndl. guld. por tuta paĝo; rabato por esperantistaj entreprenoj.
Bankisto de UEA: Mees & Hope Blaak 10, Rotterdam-1, Nederlando.



AL LA LEGANTOJ.

Ne sen miro ni konstatas, ke „Kontakto” eniras jam la sesan jaron de sia ekzisto. Ĝi estas ancorau infano, eĉ inter la esperanto-gazetaro, sed jam ne plu efemeridaĵo. Kaj tio estas la unua sukceso. Dum tiu ĉi tempo ĝi dividis la normalan sorton de la plimulto da esperanto-periodaĵoj, senĉesajn financajn kaj redaktajn embarasojn, sed tamen ĝi ŝovigas antaŭen, kaj kio pli grava, ne ŝangante la iom riske fiksitajn direkton. Temas pri ĝia konsekvenca esperantisteco laŭ forme kaj neesperantisteco laŭ en have. La tasko estas malfacila: liveri al la membroj de TEJO la enhavon enesperantan, kiu defendas sin mem en la konkurenca lavango da informaj, kiuj atakas nin ĉiutage; kiun oni prenas por legi ne pro la „interna ideo”, sed pro simpla scivolemo, deziro tralegi ion interesan. Komprenoble inter la intencoj kaj rezultoj troviĝas abismo, kiun la redakcio - konsiderante la ĉiuf flankan variecon de la Legantoj - ne kapablas transsalti sen ilia helpo. Kun plezuro mi notas do la interesigon pri ĝia sorto flanke de la Legantoj, kies leteroj kun konsiloj, rimarkoj, kontraŭstaroj ĉiam pli multaj avenas. Ili konsistigas grandan helpon en la redakta laboro.

En la redakto-jaro 196^o „Kontakto” salutas novan autoritaton de TEJO, en la persono de la Prezidanto dro Hans Michael Maitzen. Kiu ne konas la elstaran (ne nur laŭ la alteco) figuron de la populara „Miĉjo”, kiu samtempe estas doktoro pri astronomio, absolvento de la universitato en Graz. Ni ne dubu, ke sub lia gvido „Kontakto”, sekvante la sukcesojn de la tuta TEJO, pluen evoluos. Samtempe ni havu honoron danki al Ivo Osibov, kun kies prezidanteco ligas sin preskaŭ la tuta historio de nia revuo. Dankante vin, Ivo, ni ne dubas, ke vi restos plue nia intima kunlaboranto.

Kaj al vi, Karaj Legantoj, mi deziras la samon, kion al mi mem, nome, ke la regule aperanta „Kontakto” pli kaj pli kontentigu vin.

Roman Dobrzyński.

ESTRARO DE T.E.J.O.

ESTRARO DE T.E.J.O.


D-ro Humphrey Tonkin: ĝenerala sekretario, 2131 Tryon Street, Philadelphia, Pa. 19146, Usono.
Ulrich Lins, vicprezidanto, estrarano pri „Kontakto”, Gemarkenstr. 146, 5 Koln-Dellbrück, Germanio
Wouter Pilger, kasisto, Vermeerstr. 7, Zaandam-W., Nederlando
Hans Bakker, estrarano pri NEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Zuid, Nederlando
Senad Colic, regiona agado, studentaj aferoj, Halilbašica 23, Sarajevo, Jugoslavio
LANDAJ SEKCIOJ DE TEJO
ARGENTINO: Ruben Feldman Gonzalez, Bv. Orono 866 „A”, Rosario.
AUSTRALIO: F. Marquerite Fink, 88 Headingley Road, Mt. Waverley, Vic.
AUSTRIO: D-ro H.M. Maitzen, Mozartgasse 4, A-8010 Graz
BELGIO: Roger Van Humbeeck, P. de Mertenlaan 1, Brussel 9 (Jette)
BRITIO: David Smith, 20 Mardley Ed-Hill, Welwyn, Herts.
BULGARIO: BEJ, p.k. 587, Sofia
FRANCIO: JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X
GERMANIO: Uwe Joachim Moritz, Andreasstr. 57, D-5161 Merken.
HISPANIO: Salvador Aragay, Arce 8-8-4, Cornelia (Barcelona)
HUNGARIO: HEJ, Kenyérmezo u. 6, Budapest VIII

ITALIO: Edvigo Tantin, via Cappello 7/3, I 34124 Trieste
JAPANIO: JEJO, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokyo
JUGOSLAVIO: JEJA, Dobrinjska 12, Beograd
KOREO: Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seong-Puk, Seoul
MADAGASKARO: R. C. Desroches IV.X. 39 Ankazomanga, Tananarive
NEDERLANDO: J. J. Duys, Schoolstr. 96 Bergum (Fr.)

NORDAMERIKO: Arthur Morse, 4 Central Street, Millers Falls, Mass. 01349
NOVZELANDO: Tony Richardson, 78 Thackeray Street, Uper Hutt
POLLANDO: PEJ, Nowy Swiat 27, Warszawa
SVEDIO: Ingrid Carlsson, Linderbergsvagen 4, Sundsvall
SVISLANDO: Tazio Carlevaro, Viale Stazione 23, CH-6500 Bellinzona
Nealiĝintaj
BRAZILIO: BEJO, Caixa Postal 18-ZC
KANADO: Nicole Teasdale, 1778 rue
ĈEĤOSLOVAKIO: Blanicka 4, Praha 2 00, Rio de Janeiro
Notre-Dame, Trois Rivières, P.Q.
KOLOMBIO: Alvaro Villamizar Bustillo, ap.aereo 16194, Bogota-I
MEKSIKIO: Margarita Najera, Lauro Aguirre 243-3, Mexico 17, D.F.



Sur la kovrilpaĝo: Z. Sosnicka, Fotis J. Wojciewski



TEKNOLOGIO

de instruado

En la lernejbencoj de la nunaj infanoj oni legu pri la estonteco de la lando. Instruado estas la ĉefproblemo de la mondprogreso. Sen sufiĉa kvanto da kvalifikita laborforto, sen sufiĉa nombro da kvalifikitaj organizantoj de la ekonomia kaj kultura vivo de la socio - ne estas ebla progreso. Eĉ la plej komplikan maŝinon oni povas eventuale(?) importi, sed la fakulon kapablan regi ĝin oni devas eduki, instrui.

En pluraj landoj oni komprenis, ke plej profite rentumiĝas inventoj en scienco kaj instruado. Kompreneble la direktoj de la investoj dependas de la ĝenerala evoluo de la lando. En la landoj malalte evoluintaj temas pri la baza edukado, pri la batalo kontraŭ analfabetismo, dum en la landoj multe progresintaj la problemo ŝoviĝas sur la instruadon de la alta ŝtupo.

Tamen la esenco de la problemo estas ĉie simila. En Afriko manko da lernejoj kaj instruistoj same bremsas alfabetizadon, kiel en Eŭropo manko da prelegsalonoj kaj profesoroj bremsas produktadon de inĝenieroj.

Ĉie oni renkontas do inter aliaj la strukturajn malfacilaĵojn. Ja strukturo kaj instrumentado de pluraj universitatoj de Eŭropo principe ne ŝanĝiĝis ekde jarcentoj.

Solvon de la problemo oni devas serĉi en nova teknologio de la instruado. Sajnas ja paradokso, ke la tuta mondo povis spekti hejme la olimpiadon en Meksiko, kaj la homaro ne pensas pri la utiligo de la samaj teknikaj inventoj por solvi siajn esencajn problemojn.

Ekzistas tamen provoj kaj ilin ĝuste valoras pritrakti.

Alfabetizado

Ĉirkaŭ 1 miliardo da homoj pli ol 14-jaraj ne kapablas skribi nek legi. Tiu ĉi malhonora nombro konstante kreskas. Dumlonge alfabetizado havis en pluraj partoj de la mondo karitativan karakteron, estis organizata de eksterregistaraj organizaĵoj aŭ bonvolaj individuoj. Grandan meriton havas UNESCO. Ĝi sukcesis organizi en Teheran (1965) tutmondan konferencon de la klerigministroj, kie oni tute klare formulis la ideon pri la neceso ligi alfabetizadon kun la ekonomia evoluo de la unuopaj landoj.

Bona ekzemplo de la realigo de tiu ĉi ideo estas granda klerigkampanjo en la regiono Bonnamoussa en Algerio.

Pluraj landoj prilaboris longjarajn alfabetizplanojn antaŭvidantajn novan instruteknologion. Ĉefe oni utiligas radion. Ekzemple en Etiopo radiodisaŭdigoj por analfabetoj jam estas longskale aplikataj. En Malio ĉiuvespere ripetigas lecionoj por la analfabetoj en la bambara lingvo. La samo okazas jam en Cejlono, Irano, Malajzio, Argentino, Meksikujo, Hispanujo.

Filmon oni precipe ofte utiligas en Salvadoro kaj Tunezio.

Tamen televido, kiu ŝajne estas plej trafa rimedo, estas utiligata por tiu celo nur sporade en Brazilo, Usono, Ganao, Italujo, Unuiĝinta Araba Respubliko. Malgraŭ tiuj ĉi provoj la male-

voluintaj landoj cirkulas laŭ la blinda orbito: analfabetismo bremsas ilian progreson, sed malprogreso ne permesas apliki novajn instrumentadojn por rapide likvidi analfabetismon. Sen internacia kunlaboro ne estas ebla eliro el tiu ĉi situacio.

Lernejo granda kiel mondo

En la landoj alte evoluintaj proporcie pli larĝe oni aplikas novan instruteknologion. Temas ĉefe pri la utiligo de televido. Ankaŭ en tiu ĉi sfero oni devas substreki la rolon de UNESCO. Rezolucio de 1966 sugestis tiun solvon por ĉiuj landoj.

Televido permesas utiligi la plej eminentajn fakulojn, prezenti la plej aktualan scion, apliki kromajn rimedojn kiel ekzemple filmon. Televido kapablas solvi la problemon de la lernejspaco kaj instruistmanko. Ĝia rolo ne devas limigi sin nur al instruado, ĝi povas esti ne malpli utila kiel rememorigilo kaj kompletigilo de la scio por la homoj posedantaj diplomojn. Aktuala situacio prezentigas jene.

En Francujo oni revidigas kelkiujn prelegojn el Sorbonne. Krome en la Konservatorio de la Arto kaj Metio, kreita de la revolucio, okazas nun kurso pri teknikstudoj vidigata en la tuta lando.

En Sovetunio el diversaj centroj (Moskvo, Leningrad, Kiev) oni dissendas konstantajn programojn por la mezlernejoj kaj prelegojn pri la plej malfacilaj studobjektoj por la studentoj laborantaj kaj la junularo intencanta komenci studojn.

En Anglujo fondiĝas „University of the Air”, pere de kiu oni povas atingi plenvaldan diplomon

En la Germana Federacia Respubliko Bavarujo fondiĝis „Telekoleg”, pere de kiu oni rajtas ŝtate ekzameniĝi kaj sekve starti en diversaj karieroj inter alie en la meza ŝtupo de administracio.

Tamen la plej evoluinta „aer-instruado” estas en Pollando, kie cetere la tuta afero estis iniciatita. Krom la konstantaj televidprogramoj por la mezlernejoj kaj krom le agrikulturaj kursoj (500 mil spektantoj) la plej interesa entrepreno

estas „TV-Politekniko”. En ĝiaj kadroj oni dissendas 180 prelegojn dum unu jaro pri la plej malfacilaj temoj de la I kaj II studjaro de la teknikaj altlernejoj. TV-Politekniko funkcias kiel eksperimento aŭspiciata de UNESCO. Valoras substreki, ke granda parto de la televidstudentoj tute ne povus studi alimaniere ĉefe pro la izoliteco de la loĝlokoj. Jen 13% de la

polaj TV-studentoj loĝas en vilaĝoj, 25% en malgrandaj urbetoj.

Televido likvidas distancon. Tiu ĉi rimarko permesas al ni vidi reale la estontan kreon de gigantaj lernejoj kun milionoj da studentoj el diversaj landoj. La teknikaj rimedoj jam permesas tion, sed... ree ni ekstaras antaŭ la lingva problemo.

Roman Dobrzynski

Fot. J. Rosikon





STRIGSPEGULO

POPOLA HEROO.

ULENSPIEGHEL

UILENSPIEGEL - EULENSPIEGEL - HOWLE GLASS.

Frank-Ivo van Damme

Antaŭ 450 jaroj aperis en Antverpeno la unua flandra populara libro pri Strigspegulo=UlenSPIEGHEL. Antaŭ 100 jaroj aperis en Bruselo la fama verko de Charles de Coster: La legendo de Strigspegulo kaj Stultobonulo en Flandrio kaj Ekstere. Tiuj du datrevenoj estis sufiĉa kaŭzo por proklami, en Flandrio, la jaron 1968 Internacia Jaro

de Strigspegulo. Kaj same ili kaŭzis, ke aperis la unua esperantlingva eldono de kelkaj liaj aventuroj. Pluraj kulturaj instancoj, ne nur belgaj, sed ankaŭ nederlandaj, germanaj, anglaj kaj danaj, organizis manifestaciojn ekspoziciojn (i.a. en Damme, Belgio, kie la esperanto-eldono havis honoran lokon), kongresojn kaj ekskursojn laŭ-

longe de la lokoj kie Strigspegulo laŭdire vivis. Aldone kaj kulmine aperis monumenta luksa antologio en nederlanda, franca, angla kaj germana, sub titolo „En la Spuro de Strigspegulo Fripono kaj Libereca Heroo”. Kun ĝi en la mano, kaj transprenante kelkajn ĝiajn ilustraĵojn, ni provu ekscii, kiu estis aŭ estas Strigspegulo



Til kaj Nele ŝipantaj sur Skeldo, lignogravuro de Frank-Ivo van Damme.

Kiel Ulenspieghel volis flugi.

Ulenspieghel estis tre konata en multaj landoj, pro liaj plaĉaj ŝercoj kaj pro liaj friponaĵoj. Tiu de Majburgo petis lin ke li faru ion strangan. Li diris ke la tuta Popolo venu al la Foirejo, kaj ke li tie flugos.

Kiam tie multaj miloj da homoj estis kunvenintaj, li grimpis sur Domon, kaj li malfermis la brakojn kvazaŭ li volis flugi, kaj diris ridante: Mi pensis ke en la Urbo ne estas pli da Stultuloj krom mi, sed jen Urbo plena je ili, ĉar eĉ se vi ĉiuj estus dirintaj ke vi flugos, mi tion ne estus kredinta; kaj nun vi kredas ĉiuj iun Stultulon, kiu diras ke li povas flugi. Kiel mi flugu, ne havante flugilojn?

Kiam Ulenspieghel estis dirinta tion, li foriris kaj lasis la Popolon staranta; unu malbenis, alia ridante diris: Tiu ŝercema Stultulo diras la veron.

El la esperanto-eldono

ĉ 1500



Laŭ la germana eldono de 1515, kaj laŭ la flandra eldono de 1518, „En la lando Saksio estas vilaĝo nomata Knittingen (Kneitlingen). Tie Strigspegulo naskiĝis kaj en Ampelen li baptiĝis kaj ricevis la nomon Til Strigspegulo”. Laŭ Charles de Coster, tamen, „En Damme, en Flandrio, kiam majo malfermis la florojn de la oĵoj, naskiĝis Strigspegulo filo de Klaas”.

Serĉante historian personon kun la nomo Strigspegulo, oni trovas spurojn en Germanio; supozeble tiu nekonato fariĝis simbola fripono kaj ŝercemulo, kaj oni atribuis multajn rakontojn kaj anekdotojn al li. Rilate la flandran Strigspegulon. Dro Emiel Willekens

Felix Timmermans



venas al la konkludo: „Flandra, historia, Til Strigspegulo neniam ekzistis. Sed li vivas”. Kaj vere, en Flandrio la viveco de lia figuro mirigas eksterlandanojn kiuj ŝatus supozi, ke mezepokaj personoj apartenas al la mezepoko. Tion kaŭzis Charles de Coster, kiu en 1868 per sia (ĉetere francilingva) verko donis al Flandrio novigitan Strigspegulon, metante lin en la tempon de la kontraŭhispana liberiga milito, kaj farante el li la Spiriton de Flandrio. Samtempe De Coster aldonis Nele, la amatino de Til, kaj Lamme Goedzak aŭ Stultobonulo, dika, bonkora akompananto, rememoriganta pri la donkiĥota Sanĉo Panza. Se Til estas la Spirito de Flandrio, Nele estas ĝia Koro, kaj sendube Stultobonulo estas ĝia Stomako.

Sed ni revenu al la mezepoka Strigspegulo. Tiam temis ankoraŭ pri ordinara ŝercemulo, kies ŝercojn ne ĉiam ridigis la viktimojn, kaj eĉ ne plu ĉiam povas ridigi nin nuntempulojn. Liaj aventuroj tiam rapide disvastiĝis: preskaŭ samtempe kun la flandra eldono aperis en Antverpeno angla traduko, dekelkajn jarojn poste ĝi aperis francilingve en Parizo, kaj liaj ŝercoj trovis (ĉu rekte el Germanio, ĉu per Flandrio) vojon al Danlando, Svedio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio; latinaj versioj aperis en 1558 kaj 1567. En 1570 la romkatolika eklezio metis la libron en la indekson de malpermesitaj libroj, sendube pro tio, ke Til ne evitis pastrojn, farante friponaĵojn. Gis la nuntempo liaj historioj estis temoj por romanoj, poemoj, teatraĵoj, por muziko (Richard Strauss), filmo kaj televido. Ĉiam ilustristoj penis ĉize aŭ desegne vivigi liajn aventurojn, kaj pluraj skulptistoj staturigis lin.

Pri la revivigita Strigspegulo, kompante ĝin kun la mezepoka flandra bestepo Pri la Vulpo Renardo, nun parolu la antaŭnelonge mortinta belga longtempa ministro Camille Huysmans: „La plej bela verko en la flandra lingvo estas Renardo verkita de Vilhelmo, besta eposo. La plej bela verko en la franca lingvo estas Strigspegulo verkita de Charles de Coster, homa eposo. Mirige estas, ke la flandra Renardo havas francan originon, kaj ke la franca Strigspegulo havas flandran originon. Tiu kultura interligiĝo kaŭzas ofte ke iuj pensas, ke De Coster verkis sian Strigspegulon en la flandra....

Renardo trompas ĉiun: la urson, la katon, la melon, kaj precipe la leonon. Kiam tiu besta reĝo rimarkas tion, li deklaras Renardon publika viktimo kaj samtempe preskribas dian pacon inter ĉiuj bestoj. Sed tiam Renardo jam estas for, serĉante novajn aventurojn.

La historio de Strigspegulo estas alispeca. Strigspegulo faras friponaĵojn, sed la viktimoj estu nur la subpremantoj de lia patrolando. Li estas kontraŭulo de Filipo II. Ĉe De Coster, Strigspegulo faras ĉiujn siajn tradiciajn friponaĵojn je la kosto de la hispanaj okupantoj kaj iliaj kunlaborantoj. Sed Strigspegulo faras pli ol ŝercojn. Li estas ankaŭ tragika heroo. Li batalas leone. Li venĝas sian murditan patron. Li defendas sian turmentatan popolon. Li estas soldato. Li estas maristo. Li fariĝas kaptano. Li batalas surtere kaj surmare. Li estas la protektanto de la subpremata senkulpeco. Kaj kiam ĉe la fino de la batalo la lando ŝajnas liberigita, li restas staranta ĉe la buŝo de rivero Skeldo kiel daŭra gvatanto, kaj predikas la Ligon, la ekonomian unuiĝon inter Holando kaj Belgio, je bazo de religia toleremo kaj homa frateco.

Tiuj kiuj konas la du verkojn, certe protestos ke mia mallonga resumo estas tro skiza. Mi pardonpetas”.



En la jaro 1350

Ĉi tiu ŝtono metiĝis,
Til Strigspegulo
Sub ĝi entombiĝis.

Atentu kion ĝi diras:

Li vivis en ĉi-mondo pala
Kaj ĉiu kiu preteriras
Fariĝu al Til egala.

Teksto sur la tomboŝtono de Til en Molln

Krom tiun ĉi kontribuon de Camille Huysmans, la granda antologio „En la Spuro de Strigspegulo” donas lavangon da materialoj, pri historio, evoluo, disvastiĝo de la figuro Strigspegulo. Ĝi represas ne plu haveblajn eldonojn kaj fragmentojn el aliaj; ĝi aldonas grandan aron da ilustraĵoj el multaj jaroj kaj landoj. Ĝi kombinas sciencajn studojn kun literaturaj konsideroj. Malmultaj flankoj de Til restas nelumigitaj. Eĉ liaj tomboŝtonoj (-j!) ne restas nemenciitaj.

Se tiu ĉi, necese mallonga, artikolo vekis vian intereson pri tiu ĉi popola heroo, kaj se vi komprenas unu el la kvar uzitaj lingvoj, „En la Spuro de Strigspegulo” estas inda donaco por vi; se via lingvokono aŭ monaj eblecoj ne sufiĉas, vi eble kontentigos per la esperantlingva eldoneto. Ĉiukaze ankaŭ por vi Strigspegulo denove vivos.

* Ulenspieghel, tio estas Strigspegulo, tr. P. Wolrug, Vulpo, Amsterdam, 1967, 16p, il. per il. el la unua flandra eldono, 2 gld. = 8 st.

** In het spoor van Ulenspiegel, red. B. Peleman, Heideland, Hasselt, 1968, 304p, 26x31 cm, 100p da il., 850 bfr. = 250 st.

Frans Masereel





C₂H₅OH SUR LA TERO

Nia amiko Haĉjo estis ebria. Tio ne signifis ion nenormalan - li jam delonge estadis ebria. Sed ĝuste tio kaŭzis, ke tiu stato - pro monmanko - ĉiam pli malfacile povis esti certigata. Eĉ liaj plej bonaj amikoj riskis apenaŭ pli ol unu stelon por liberiĝi de tiu samtempo, kiu insistege petis pri amika monoservo.

Temis pri tio, ke lia sanstato post dekdu horoj de senalkoholeco estus tia, ke kompare al ĝi „delirium tremens” estus kiel la flustrado de zefiro kompare al hurikano.

Tri kaj Naŭ devenis de la planedo Ti-En, kiu estas la dua (kaj sole prilogebla) planedo de certa verda stelo ĉe la ekstera rando de la galaksio. Tri kaj Naŭ nature ne estis la plenaj nomoj, ĉar la nomoj de la Ti-En-anoj konsistas el ciferoj. Ekz. la plena nomo de Tri estis: 389 057 998 141 (kompreneble laŭ transformo en la decimal-sistemon).

En la momento kiam Haĉjo baraktis en la krizo, la Ti-En-anoj troviĝis en distanco de 1,5 kilometroj for de li. Nek ili estis en aviadilo, nek en fluganta telero, sed ili moviĝis per „spackubo”. Ĝuste per tio ili kapablas eluzi ekkonitaĵojn de Einstein-a relativecteorio. Ĉar ili estis pli rapidaj ol la tempo, ili povis estis pli rapidaj ol la lumrapideco, kiu normale estas la limo de rapidecoj.

„Ĉu ni surteriĝu?” Tri demandis Naŭ. „Bone, ek!” respondis Naŭ.

Haĉjo rigardis la estaĵojn. Nenio ĉe ili vekis timon: Ili estis verformaj, proksimume 5 metrojn longaj kaj 30 cm dikaj. Ĉe la finaĵoj ili grade maldikiĝis. Koloro estis agrable verda, helverda precize. Sensorganoj ne rimarkeblis, do oni ne povis diri, kiu finaĵo estas kiu, sed tio ne gravis, ĉar ambaŭ estis samaj. Volvite spirale Tri kaj Naŭ alproksimiĝis al Haĉjo.

Haĉjo ekvidis ilin kaj tuj kriis „Heja, knaboj, bone ke vi estas

ĉi tie, vi certe invitos min je trinkaĵo?”

„Reago nelogika” diris Tri al Naŭ. „Ĉu ni prenu lin?”

„Hup, se vi, hup, aĉetas trinkaĵon al mi, mi venas kun vi, hup”. konstatis Haĉjo fronte al la deziro de ambaŭ, ke li akompanu ilin. „Sed mi volas scii, kien!”

„Ti-En” respondis Tri.

„Ha, vi volas diri, de tie tien? Ne sinjoroj, mi neniam nenien ne iros, se ne tuj mi ricevas ion por trinki”.

Post aserto, ke en la kubo li ricevus trinkaĵon, Haĉjo tamen konsentis kaj libervole kun Tri kaj Naŭ eniris ĝin.

Tri iris al la regulilaro kaj diris al Naŭ: „Ni troviĝas en la intermonda spaco, mi proponas, ke ni restu ĉi tie, ĝis ni estos precize ekzamenitaj tiun ekzempleron kaj decidintaj, ĉu ni entute povos uzi ĝin por niaj celoj”.

„Hej, uloj, kiel statas la afero kun mia trinkaĵo?” Haĉjo ekzorgis pri sia senpera estonto kaj liaj manoj ekstremis.

„Ŝajne li suferas” diris Naŭ „eble pro malsato aŭ soifo. Kion trinkas tiuj estaĵoj? Hidrogen-superoksidon kiel ni?”

„La plejparto de la surfaco de tiu ĉi planedo estas kovrita per akvo, en kiu troviĝas natriumklorido. Ĉu ni iom sinteze produktu por li?”

Haĉjo ekplorkriaĉis: „Je Dio, neniam, ne! Eĉ ne akvon SEN salo.

Mi deziregas alkoholon, viskion!!”

„Ĉu mi analizu lian materiinterŝanĝon?” demandis Tri. Li iris al stranga maŝino, kie lampetoj ek-kaj malekfunkciis. Tri konstatis: „Strangege! Lia materiinterŝanĝo baziĝas je C₂H₅OH.” „C₂H₅OH?”

„Jes, alkoholo - almenaŭ kiel bazo. Kun certa aldono de H₂O kaj sen la salo, kiu troviĝas en la maroj. Krome troveblas ankoraŭ minimumaj aroj da aliaj materialoj. Entute estas 234 promiloj en sango kaj cerbo”.

Petegis Haĉjo: „Hometoj, mi mortas por trinkaĵo. Ĉesigu viajn stultaĵojn kaj donu al mi iom”.

„Atendu iomete” diris Naŭ „mi preparos por vi, kion vi deziras”. Pliaj lampoj eklumis kaj estingiĝis kaj Naŭ iris en angulon de la kubo, kie li manipulis en la tiea laboratorio. Post unu minuto li revenis kun glaso enhavanta proksimume du litrojn de flaveca likvaĵo.

Haĉjo prenis la glason, ĉirkaŭflaris ĝin kaj trinketis iomete. Ekĝemis li. „Min trafas apopleksio, tio ja estas viskio, pordia trinkaĵo, ne plu superebla!” Per grandaj glutoj li trinkis.

„Pri kio temas?” demandis Tri al Naŭ.

„Sufiĉe komplika formulo, kiu precize akordiĝas al liaj bezonoj. Konsistas ĝi el 50% alkoholo kaj 25% akvo. La aliaj konsistaĵoj estas laŭnombro konsiderindaj. Ili ampleksas ĉiun vitaminon kaj mineralon bezonatajn de lia organismo. Aliaj materialoj plibonigas la guston - kiel li estas kutimiĝinta”.

Haĉjo ĝemis kaj trinkegis. Iomete li ŝanceliĝis. Li rigardis al Tri kaj rikanis: „Nun mi scias, ke vi ne estas ĉi tie” li diris.

„Kion li opinias” Naŭ demandis Tri.

„Liaj pensoperacioj ŝajnas esti komplete nelogikaj. Mi dubas, ĉu lia specio liverus uzeblajn sklavojn. Kiel vi nomiĝas, estaĵo?”

„Kion signifas nomo, kamarado” redemandis Haĉjo. „Diru ion al mi. Vi uloj estas miaj-j-j plej bona-j-j aam-m-mikoj. Kunprenu minnnn kien vi volas-s, eĉ ti-en”.

Post lasta gluto li kuŝiĝis sur la planko. Strangaj sonoj elvenis de li kiujn nek Tri nek Naŭ kapablis interpreti: „zzzz, glup - zzzz - glup - zzzz - glup” ktp. Ili provis vekskui lin, ne eblis. Post kelkaj horoj nur, li vekigis, eksidis, ekgapis ilin kaj diris: „Mi ne kredas ĝin. Vi ne estas ĉi tie. Je Dio, rapide donu ion por trinki!”

Tri donis denove plenan glason al li kaj konstatis al Naŭ: „Tro stulta, por esti dresata iucele, escepte por simpla manlaboro. Sed se li havas sufiĉe da energio

kaj daŭremo, ni povas rekomendi lin por grandatako kontraŭ tiu ĉi planedo. Ekzistas supezeble tri aŭ kvar miliardoj da enloĝantoj sure. Tri ĝis kvar miliardoj da simplaj laboristoj estus granda helpo por ni”.

„Kiel vi nomiĝas, estaĵo?”

„Nomu min Haĉjo!”

„Ĉu tiel nomiĝas vi aŭ via specio?”

„Kio estas specio?”

„Ni volas testi vian energion kaj daŭremon, Haĉjo! Kuru de unu flanko de la kubo ĝis la alia kaj returne ĝis kiam vi laciĝas! Intertempe mi tenos la glason kun via nutraĵo”. Li prenis la glason el la manoj de Haĉjo, kiŭ petis pri ankoraŭa gluto.

„Eble li ĝin bezonas” diris Tri „donu ĝin do al li, Naŭ”.

Haĉjo ridetis „Ĝis, kamaradoj! Ni vidos nin ĉe la konkurso! Vetu je mi: venko, placo, sed antaŭe ankoraŭ gluteton, ĉu ne?”

Ankoraŭ li ricevis etan gluton - vere etan ĉifoje, malpli ol tri dekonojn da litro.

„Nun fino! Iru, kuru, ek!” komandis Tri.

Haĉjo faris du paŝojn kaj falis teren sur la vizaĝon.

Feliĉridete li turnis sin sur la planko kaj kuŝadis poste.

„Nekredeble” diris Tri „Eble li volas nin mistifiki?”

„Nekredeble, vere, post tiu eta streĉo! Sed li estas komplete svena kaj li ne trompas nin. Lia tipo por Ti-en komplete senutilas. Ekreguligu nin al la ĝusta orbito, ni returnas. Ni kunprenos lin tamen, sekvante nian kromordonon, kolekti objektojn por nia zoologia ĝardeno. Rentumas, havi lin tie, ĉar laŭkorpe li estas la plej strangega objekto, kiun ni iam ajn ie ajn eltrovis en la kosmo”.

Tri volviĝis ĉirkaŭ la stirrado kaj per siaj ambaŭ finaĵoj direktis la kubon.

En la ĉefurbo de Ti-en, kiu regas milojn da utilaj kaj vizitis milionojn da senutilaj planedoj (kiel la Teron) Haĉjo nun priloga kiel vere komplete maltaŭga objekto grandan vitran kaĝon, kiu estas lokigita sur honora placo. En ties mezo troviĝas baseno, el kiu li ofte trinkas kaj sinbanas. La likvaĵo estas la menciita.

La vizitantoj de la zoologia

ĝardeno plenumas la strangan ekzempleron, kies nomon ili legas ekstere sur la kaĝo:


ANONYMUS ALCOHOLICUS: nutriĝas per C₂H₅OH, riĉigita per vitaminoj kaj mineraloj. Okaze brila, sed komplete nelogika, forto kaj daŭremo: povas fari nur kelkajn paŝojn, sen ekfali. Komerce komplete senvalora, sed fascina ekzemplero de la plej stranga vivoformo ĝis nun malkovrita en la galak-

sio. Priloĝas planedon 3 de la suno IX 345 621 902.

Tiel strange li aspektas por la Ti-en-anoj, ke ili konservis lin poreterne viva. Kaj tio estas bona.

Ĉar en kazo de lia morto, ili estus devigataj reveni al la Tero por preni duan ekzempleron. Kaj ili povus trafi Vin aŭ min — kaj Vi aŭ mi hazarde povus esti sobraj tiam. Malbone por ni ĉiuj Teranoj!

Fot. J. Hankiewicz



NEĜA KAR



Prosperan

kaj ĝojan

1969

deziras

Kontakto



Kiam la teron kovras lanuga neĝo oni renkontas dum karnavalaj tagoj en Pollando, speciale en ĝia orienta parto, longajn karavanojn de sonorantaj sledoj. Ekde jarcentoj junularo sledumis tra la vastaj, malplenaj ebenaĵoj, tra la arbaroj de unu vilaĝo al la alia. En ĉiu vilaĝo atendis kolektiĝintaj aliaj sledoj por postsekvi la karavanon. Nun la tradicion ĉefe subtenas studentoj. La karnavala sledekskurso daŭras tutan tagon ĝis malfrua nokto. Ĝi finiĝas nokte en arbaro. Ĉe fajrujo oni manĝas kaj dancas. La karavano revenas kun torĉoj kaj kantoj. La neforgesebla aventuro nomiĝas „Kulig”.




NAVALO

Fotis Marek Czudowski









NOVA KINO



LA BRAZILAJ SUNO KAJ OMBRO

„Kino devas celi plibonigon de la mondo, en kiu ni vivas. En nia kazo - plibonigi la realaĵojn de la lando, al kiu ni apartenas”. - diris Glauber Rocha, eminenta reprezentanto de la juna kino brazila. Kiel realigi tiun ĉi vastan programon? Unue diskonigi la brazilan realecon. Montri la kontrastojn inter la metropoleco de Sao Paulo, lukso de Brasilia, kaj senespereco de la internaj provincoj.

Ne hazarde do en la pluraj verkoj de „cinema novo” aperas kruda, dokumenta registrado, ŝajne senemocia konstato.

Tiel estas en „Senpluveco” de Nelson Pereira dos Santos kaj en „Karabenoj” de Ruy Guerra. Monotona, sunbruligita pejzaĝo, homoj agmalemaj, jen Brazilo malkovrita de la „nova kino”. „Senpluveco” rakontas pri la sorto de malriĉa farmisto migranta de unu loko al la alia kun la espero trovi laboron.

Sed la senkompata suno kaj drakanaj laborkontraktoj lasas nur unusolan perspektivon de senespera vagado kaj besta vegetado.

Ĉe Ruy Guerra la portreto de la lando estas eĉ pli tenebra. La kamparanoj, izolitaj de la ekstera mondo, ne scias eĉ, kiu estas ilia prezidento. La aŭtoritaton reprezentas tie la karabenoj, kaj ilin oni nur estimas. Kiajn brazilajn filmojn ni rigardis ĝis antaŭ nelonge?

De unu flanko serie, komercele produktataj „chanchadas” - kantodancaj bildoj, de la alia flanko ŝajne sociproblemaj filmoj trompantaj spektantaron per facila ekzotiko kaj krueleco. „La nova kino” aperinta antaŭ 6 jaroj provas kontraŭstari la tradician komercan filmindustrion. Reprezentata ĝin antaŭ ĉio Glauber Rocha, Paulo Cezar Saraceni, Ruy Guerra.

Estas paradokso, ke la filmoj de la brazila nova kino estas pli famaj eksterlande ol en Brazilo mem. Plimulto de la „novaj” filmistoj studis en Eŭropo, kaj ili mem emfazas kunligecon de sia arto kun la eŭropa neorealismo. Sed pri la individueco de la brazila „nova kino” decidas ilia popola ekzotikeco.

Ili rakontas pri la lando, kie

la konglomerato de la kulturoj kaj religioj kreis specifan rezervejon de malklereco kaj superstiĉo. En „Karabenoj” tra la malsata regiono marŝas procesio akompananta „sanktan bovon”. En „Diablo kaj Dio” senesperigitaj kamparanoj idolas al diablo por demonstri sian malkontenton pri la „dia zorgo”. „La pastro kaj knabino” de Pedro de Andrade rakontas la historion de pastro travivanta kredkrizon post prisperto de la mizero.

La procesianta homamaso el „Karabenoj” finfine ĵetas sin kontraŭ la „sankta bovo” krianante: „Viandon!”

Sed ĝenerale tiuj ĉi filmoj ne formulas iujn solvproponojn. Ŝajne tio nur substrekas la maturecon de la junaj filmistoj komprenantaj la malsimplecon de la brazila situacio.

Provu spekti la filmojn de la brazila nova kino, ili formas gravan kontribuon al la ekkono de la nuntempa mondo.

R.D.

Supre: „Tarahumara”
(Luis Alcoriz)
Dekstre: „Karabenoj”
(Ruy Guerra)



ĉe la kaskado de Iguassu

Homaj formikoj
alkroĉitaj al vand' de l' kanjono,
nevideblaj en nebula verdo,
en ĝangal' de varmeg' sufokitaj
tremas
sur rand' de l' abismo,
kie unu kilometron malsupren
akvo estas nur bolanta
lumo.

Ili ĝuas vidi
sovaĝe stapliĝintajn ŝtonojn,
stapliĝintajn senvive urbojn - gigantojn,
kiuj mortis iam pro io sekrete,
ŝtonojn abrupte pendantajn
en kolor' erika.

Ili miras:
ĉielo stumpletis dumsalte
kaj kuŝante
sur rand' de l' abismo
ploras
per cent okulparoj
angoraj kiel okuloj de kapreolino,
kiu ekvidis fulmon de murdo -
ĝi ploras
per cent okulparoj
tiel brile verdaj,
kiel pupiloj de jaguaro
atence vantanta
ĉe fonta trinkejo -

ĝi ploras
per okul' de maljunulo,
kiu spertis
kaj scias,
sed ne plu povas transdoni la scion,
ĉar je on' da momento tempo malfruigis,
en kies pupilbrilo fokusas
ĉiu timo kaj aŭdac' de l' mondo -

ĝi ploras
per cent okulparoj, kiel okuloj
de nudaj knabinoj pelitaj en fajron,
videblaj hodiaŭ en Auschwitz
sur fotografaĵo tiutempa,
rigardataj de ni sataj kaj vestitaj,
sed ne sciantaj pri sia momento ---

ĝi ploras,
haron nigran, verdan, rustkoloran
lasas en la venton.....

16

Stonoj,
ŝtonetaĝoj,
ŝtona rubo.
Jen larmoj vivas arĝente
sur vandoj de pauco
de vulkana morto.

larmoj gutantaj mole,
kalme
laŭ abruptaj randoj...

Kaĵolas katide
aer' varma, sponga,
ombr' humida nin gvidas tra galerietoj
laŭ vojet' zigzaga.

Ni ĝuu!
Se ni fuĝos de ĉi tie,
neniam ni trafos patoson.
Se ni fuĝos de ĉi tie, ni fuĝos probable
for de nia sino.

Malantaŭ kurbig' de l' kanjono
horizont' frakasita tempeste.
De latunaj pintoj, de ĝiba Gjevonto,
de alpag rokandoj,
de flamanta glaci' sur Annapurna,
de Etna montranta langojn de la fajro
ruliĝas inundo
kaj balancas rokon,
inversigas abismon
por malkaŝi fundon, stelon kaj nubon,
ŝirkaptas
kaj malsupren portas.

Esperantigis: Maria Ziolkowska
Antoni Olcha

Diversaj flankoj de la tempo
Fero mi estis
apud kampfloro,
kuglo de venĝo,
fumo de ploro -

larmo mi estis,
de kruco brako -
timo de birdo,
trist' de Spartako -

au iluzio,
au krio pava,
au Di' potenca,
kiu ne savas -


mi - fotonsipo,
mi - infan' eta
rompinta gambon
por alumeto.

Kiu mi estis? Kiu mi iĝas,
dum tempo fuĝas senkonsole?
Ebleco?
Ebleco unusole.

Esperantigis: Roman Dobrzyński.



Sankta Maria de Taŭl
Kuninfana Virgulino



San Pedro de Sorpe
Anoncado al Maria

Romanikaj freskoj

La romanika kataluna pentrado fariĝas fama, tiel pro la abundo kaj kvalito de la koncernataj verkoj, kiel pro la pacienata peno pri studado kaj diskonigo jam komencitaj antaŭ pli ol duonjarcento.

Pri freskoj grava rimarko rilatas al la konservado de tia delikata arta materialo. Evidentiĝas tiurilate du kontraŭaj metodoj en Francio kaj Hispanio. Kiam en Francio muran petraĵon oni lasas en la origina kadro kaj nur kopiojn havas muzeoj, tiam la plejmultaj katalunaj freskoj estis elmurigitaj, fiksitaj sur tolojn kaj transportitaj al la muzeoj en Barcelona, Vich, El Prado, Gerona kaj Solsona, almenaŭ se oni sukcesis malebligi ilian vendon al Usono. Sendube la hispana metodo garantias pli bonan protekton al la originaloj.

Katalunio distingiĝas en Hispanio per multaj freskoj kaj pentritaj altaran-taŭaĵoj; sed nur la murajn pentraĵojn mi pritraktos. La tekniko uzita en Katalunio malsimilas la grekan, la italan kaj la francan, do estas tipe hispana. Studis ĝin Profeso-ro Kuhn, fama usona arkeologo. Jen la plej gravaj karakteroj: la artisto unue strekis konturojn kaj poste aldonis farbojn sur ĵusmetita freŝa gipso; sed ĉiuj detaloj kaj finado estis faritaj kvazaŭseke sur la gipso iomete malsekigita. Tiu simpla tekniko precipe kontraŭas la longan kaj kompleksan tielnomatan grekan teknikon; ĝi tamen adherigas tre bone farbojn ĉe la muroj. Sed krome malsimilas la kataluna fresko al aliaj pro sia aparta fono: oni povas paroli pri nek hela nek malhela fono; temas pri horizontalaj farbobendoj brunaj, flavaj, ruĝaj, k.t.p., procedo, kion oni interrilatigas kun miniaturoj en hispanaj manuskriptoj, precipe en la Komento pri Apokalipso, skribita de monaĥo Beatus dum la 8a jarcento, poste transkribita kaj ilustrita de la 9a ĝis la 12a jarcentoj. Origine tiuj farbobendoj figuris maron, teron, ĉielon; sed ili fariĝis tre frue nura artistika konvencio. La plejbone konservataj katalunaj pentraĵoj ornamis la preĝejojn Sankta-Klemento kaj Sankta-Maria-de-Taull. Taull estas vilaĝo en la valo de Boi, kiu dependis de la riĉa diocezo de Urgell. Tuj rimarkiĝas la konstruovireco de tiuj preĝejoj, dum la interna dekoracio mirigas per siaj originaleco kaj beleco. Tiel granda kontrasto devenas de tio, ke por la navo pagis la vilaĝanoj kaj por la ĥorejo pagis la nobeloj. Eĉ pri la pentrado de freskoj ekzistas diversaj stiloj, ĉar, se lokaj artistoj ĝenerale okupiĝis pri la muroj de la navo, nur la famaj majstroj ricevis la taskon ornami la murojn de la ĥorejo. Tial la katalunaj arkeologoj sukcesis rekonstrui la arton de grandaj majstroj en multnombraj preĝejoj de tuta Hispanio. La absido de **Sankta-Klemento-de-Taull**, datumita de 1123, estas unu el la plej konataj. Tie Apokalipsa Kristo sidas en blufona mandorlo ornamita

TREZOROJ DE KATALUNIO

Sta Klemento de Taull, kapo de Pantokratoro



Fotoj de la Aŭtorino

per palmobranceloj; lia vizaĝo ŝajnas serioza kaj regema. Flanke de la Pantokratoro (1), staras du grandaj serafoj, kiuj portas emblemojn de sanktaj Johano kaj Mateo. Sube anĝeloj aperas nur mezkorpe. Ĉe la malsupra parto de la absido estas pentritaj, sub fantaziaj arkadoj, Sankta Virgulino kaj apostoloj, ĉiuj tre fronte starantaj. Tiu stranga Virgulino, farita nur per kurboj tenas en sia vualita mano larĝan pokalon, el kiu ruĝaj fumo-ĝlitigigas. Tiu ĉi motivo ekzistas nur en la kataluna pentrado; oni supozas, ke temas pri la Graalpokalo. Arkadoj, kolonoj kaj kapitejoj figuras konstruaĵon, sendube ĉielan Jerusalemon, tio estas Paradizo. Sur la triumfa arko: enirarko al absido, estas prezentita, sin apogante sur stango, malriĉa Lazaro, kun multnombraj vundoj, kiujn lekas hundo. Tiu kortuŝa fresko multe kontrastas kun la hieratika indifereco de la absidaj scenoj.

Je **Sankta-Maria-de-Taull** regas granda riĉeco en la dekoracio. La enabsida impona Virgulino drapiras sin per vivkoloraj teksaĵoj ornamitaj de juvelŝtonoj, kaj sidas sur ora trono. En la zono de la apostoloj oni rimarkas iom da ritmo, iom pli da kunligo. Sur la flankaj muroj, verŝajne de alia pentristo, vivo kaj naiveco stampas la scenojn: Davido ĵetas grandegan ŝtonon al Goliato; samtempe li tranĉas la kapon de tiu-ĉi, kiu jam fermas la okulojn!

Pli graciaj kaj simple desegnitaj estas la Maga Reĝo kaj la sesflugilaj serafoj de **Sankta-Maria-de-Aneŭ**, aŭ la reverma Maria en la Anonco de **Sankta-Petro-de-Sorpe**. Ankoraŭ pli delikataj sed iom pli freŝdataj, estas la anĝeloj de **Casserres** kun eksterordinaraj grandegaj nigraj okuloj; tiuj anĝeloj ornamis funebran monumenton atributan al la Majstro de Llussa. Tiuj ĉarmaj siluetoj trumpetas anoncanta la Tagon de la Lasta Juĝado. Korpomovado, vestaĵoj, flugiloj, brakoj trumpetoj; ĉio estas farita per kurboj



Ankaŭ tre mildaj estas la rozetaj kaj bluetaj nuancoj sur la roboj, dum la longaj blondaj haroj falas sur la anĝelajn ŝultrojn.

Sed mi ne volas silenti pri la famaj freskoj de **Sankta-Maria-de-Tarrasa**, nordokcidente de Barcelona, unu el la esceptoj, kiuj restis en la origina kadro. La absido de la preĝejo estas konsekrita al sankta Tomaso Becket, murdita en la jaro 1170, kanonizita du jarojn poste. Tie-ĉi la desegno de la absido ŝajnas tre simpla; estas nek troŝarĝa dekoracio, nek granda farbopaletro: multe da ruĝa okro, verdo kaj violbluo sur la vestaĵoj de la diversaj personoj, nome Kristo, sankta Tomaso kaj soldatoj. Temas jam pri iom pli freŝdata arto, kiu volas sin realisma; la rigideco de la Majstro de Taull malaperis. Nun la artisto volas fari ion konvinkan, pro tio komenciĝas rakonta stilo: jam en Tarrasa, oni tuj rimarkas kronologian ordon inter la scenoj. Tipa fakto ĉe la kataluna pentrado: ekzekutistoj ĉiam havas forpuŝe malbelan vizaĝon kaj oni rimarkas tion ankoraŭ pli, kiam temas pri pentritaj altaran-taŭaĵoj.

La kataluna romanika pentrado fariĝas unu arta fonto preskaŭ neelĉerpebla, tiel multnombraj kaj grandkvalitaj estas la verkoj. Ilia studado certe ne finiĝos antaŭ longe, despli ke problemoj pri datado kaj deveno de la artistoj ĉiam partigas la mondfamajn arkeologojn. Ek de duonjarcento la katalunaj arkeologoj, nome José Gudiol kaj José Pijoan klopodas por kolekti la plejgrandan nombron da freskoj, ĉar pluraj estis venditaj en multoblaj pecoj al Usono.

Tiu sorto okazis al kelkaj verkoj de la Majstro de Maderuelo, kiu realigis inter aliaj la pentritan dekoracion en la absido de Sankta-Maria-de-Taull. Ĉiu artŝatanto plezuros kontempli tiujn freskojn aŭ en la originaj preĝejoj aŭ en la hispanaj muzeoj, kie ili estas rimarkinde bonege prezentataj al publiko.

LA SEKSO

kaj la civilizo

Laŭ dro K. Imielinski

Tipa por niaj tempoj estas kolizio inter la homo kaj la de li kreita civilizo. Rezulte de tio normoj biologiaj ne ĉiam kongruas kun normoj sociaj. Tiujn konfliktojn oni facile konstatas en la seksa sfero de la homa vivo. Krome la niveloj etika kaj kultura de la seksa kunvivado dependas de la edukondiĉoj, de tio kiel la konkreta medio influas sian junularon. Rezulte individuo kolizias ne nur kontraŭ la biologiaj leĝoj, sed ankaŭ kontraŭ la normoj etikaj kaj sociaj.

Unu el tiuj konfliktoj rezultas el la fakto, ke ĉiam pli plilongiĝas la periodo daŭranta ekde la seksa maturiĝo de la individuo ĝis lia socia plenkreskeco, t.e. ĝis la atingo de materiala memstareco, kiu ebligas al la junaj homoj establi propran familion. La alian konflikton rezultigas tipaj por nia civilizo artefaritaj stimuloj en la sfero de erotismo, kion ne ĉiam sekvas disstreĉiĝo. En tia situacio de la artefaritaj seksaj impulsoj oni senŝarĝiĝas nenature. La evoluon de nia ci-

vilizo akompanas kresko de varieco de la seksa vivo kaj kresko de seksaj anomalioj. La seksa instinkto videble sendependiĝas de la memkontrolo de la individuo, kio estas certe socie damaĝa procezo.

Malnatura stimulo de la seksa instinkto okazas nuntempe ĉiupaŝe en amaso da presaĵoj, en kino, televido. Eble ne tiom gravas, ke la homoj estas ĝenerale ekscitataj, kiom gravas, ke tio trafas junularon tro frue. Tro frua veko de la seksaj impulsoj dum ne formiĝis ankoraŭ ĉe konkreta individuo psikaj bremsiloj, kaŭzas traŝovon de la vivceloj ĉiam pli en ekskluzive seksan sferon kaj superregon de la seksa instinkto super la tuta personeco de la juna homo.

Cetere, apero de seksaj impulsoj dum mankas eblecoj de la natura seksa disstreĉiĝo gvidas al la seksaj anomalioj, kiuj sekve al pluraj individuoj malebligas asimiliĝon al la familia vivo kaj estas fonto de iliaj personaj tragedioj.

Kun la artefaritaj seksaj stimuloj ligas sin populara nuntempe fenomeno nomata pigmalionismo.

Sub tiu ĉi termino oni komprenas agojn de onanismo praktikatajn kaŭze de ekscitiĝo helpe de bildo, fotografiaĵo, skulptaĵo de nudaj homfiguroj. Longe praktikata pigmalionismo povas sekve malebligi adaptiĝon de la individuo al la geedza kunvivado.

La intima vivo (3)

Kiamaniere kontraŭstari tiun situacion? Ĉu eblus organizi la gazetaran kontrolon laŭ tiu ĉi vidpunkto? Senespereco de tiaj provoj videbliĝas tuj, se oni konsideras, ke erotismo en la amaskulturo estas grandskale profitdona komercvaro.

Aliflanke ne nur kulpas gazetaro. Ankaŭ ni konsideru, ke en la nuntempa mondo juna homo ĉiam pli multe lernas, plej ofte en soleco, senmove. Guste tio kontribuas al la intensiĝo de la pensoj pri la sekso. Samtempe ni observas konstantan forpuŝadon de la sporto el la lernejoj programoj, dum sporto, alivorte multa movo, ludas en tiu sfero gravan pozitivan rolon.



NORMOJ

La seksa aktiveco estas integra parto de la personeco, same necesa kaj utila kiel la aliaj sferoj de la homa vivo. En ĝi mem ĝi troviĝas do ekster iu ajn morala pritakso.

Neniu diskutas pri la morala aspekto de la manĝbezono aŭ moraleco de gambo aŭ mano. Nek la homaj organoj nek iliaj funkcioj estas en si mem moralaj aŭ malmoralaj. La samo koncernas sekson. Nur la

rezultoj de tiuj funkcioj en la formo de konkretaj agoj povas esti pritaksataj laŭ morala vidpunkto.

Plej ĝenerale oni devas konsenti, ke moralaj etas tiuj agoj de individuo, kiuj estas konkordaj kun liaj bezonoj sed ne kaŭzas domaĝon al la aliaj individuoj. Tiu ĉi principo etendiĝas je ĉiuj sferoj de la homa vivo kaj estas zorge detaligita en la lavango da leĝoj kaj kutimoj. Ni priatentu

nur la regulojn koncernantajn strattrafikon. La moderna homo scias ekzakte kiel moviĝi surstrate kaj havas por sia dispono rektajn, larĝajn vojojn, dum en la seksa sfero li iras en obskuro laŭ mallarĝaj, serpente noditaj vojetoj, plenaj da bariloj, ŝtonoj kaj truoj.

Aliflanke tamen la limoj de la „normaleco” en la seksa sfero estas tre malfacile difineblaj. Laŭ la socia vidpunkto la seksa aktiveco de individuo preterpaŝas normojn, se ĝi ĝenas liajn eksterseksajn strebojn aŭ malebligas al li adoptiĝi al la socia vivo.

La opinioj pri la seksaj normoj ŝanĝiĝas, krome ili diferenciĝas depende de la geografia longitudo.

En iuj indiĝenaj triboj en Latinameriko estis malpermesita konsumado de viando kaj tute normala estis publika seksumado. En aliaj triboj la rango de knabino kreskas proporcie al la nombro da eksteredzaj infanoj, dume la malnovjuda juro punis senvirgecan fraŭlinon.

En Eŭropo ankoraŭ antaŭ 100 jaroj „seksa malvarmeco” - sento de malplezuro dum la seksa akto - estis socia normo por virinoj, dume nun la „seksmalvarmeco” estas kvalifikata same kiel „impotenteco” ĉe viro.

En pluraj medioj virgulinio ne plu estas modelo por knabinoj, eĉ kontraŭe okazas, ke ŝi mem estas ŝercobjekto. Estas klare, ke la „virgulina modelo” de knabino rezultas el tio, ke dum jarcentoj la vira mondo formadis la psikon de la virinoj konforme al siaj reguloj. La nuna socia revolucio en la sfero de kutimoj kaj moralo fontas memkompreneble el la vasta, ĉefe ekonomia kaj jura sendependiĝo de virino, precipe en la landoj alte evoluintaj. Samrajteco de virinoj kaj viroj ne povas tamen neglekti la esencajn biologiajn diferencojn de ambaŭ seksoj kaj resultantajn el tio diferenbezonojn.

Ankaŭ en la seksa sfero la subordigon de unu el la partioj devas anstataŭi „kunagado”.



MOZAIKO

klacejo internacia

Pollando

10-jara Slawek el Siemianowice konfesis en la hospitalo, ke li efektive formangis sapon kun la intenco malmanigi sin. La knabo kredis, ke dank' al tio li ne devos iri al la lernejo kaj povos sengene spekti antaŭ la televidilo la olimpiadon.

Danlando

En Kopenhago vivas 1548 milionuloj tio signifas, ke la enspezoj de ĉiu el ili atingas minimume 1 milionon da kronoj dumjare.

Italujo

Anonco en unu sicilia gazeto: „Mi perdis dokumentojn kun la persona legitimilo, familiaj fotografaĵoj kaj 70 mil liroj. Eventuala trovinto rajtas reteni la dokumentojn kaj fotografaĵojn, sed estas petata redoni la monon, kun kiu mi estas sente ligita”.

Usono

Laŭ la raporto de la polic-(FBI)-ĉefo Hoover - en Usono murdo okazas ĉiun 48-an minuton, perforto ĉiun 19-an minuton, rabo ĉiun 2,5-an minuton, aŭtoŝtelo ĉiun 48-an sekundon.

Tanzanio

En la nacia parko Serengeti vivas libere leonoj kun porkonstante fiksitaĵoj transistorsendiloj, kiuj permesas detale observi la konduton de la bestoj. Evidentiĝas, ke leonoj ripozas 20 horojn diurne.

Libano

- Mi konsentas kun la opinio, ke virinoj pli brave ol viroj rezistas suferojn.


- Ĉu vi estas kuracisto?

- Ne, ŝuvendisto.

Informagentejo „Kontakto”

En la momento, kiam vi legas ĉi tiujn vortojn eble estas naskiĝanta aŭ naskiĝinta aŭ tuj naskiĝonta la 3,5-miliarda homa estaĵo.

Ĉiutage la homaro de la tero pligrandiĝas je 180 mil personoj.



PENSOJ

Zorgoj estas la plej bona distro.

Anatole France

En akvo krokodilo estas nevenkebla.

El la Oriento.

Dumvoje zorgu pri la gamboj,

dumparole - pri la lango.

Malaja proverbo.

Ami ne ŝirmante siajn okulojn -

jen la arto!

Cyprian K. Norwid

Ridante paroli veron.

Horatius.

Ombrelo ne ŝirmas kontraŭ propraj larmoj.

Hazarde aŭdita.

Plej malfacilas paroli, kiam oni hontas silenti.

La Rochefoucauld.

Esti reĝo de la bestoj? Neniam!

La kato de prof. Lapenna

vidante leonon en kaĝo.

P.S. Mi intencas prezentiĝi publike

sub iu trafa pseŭdonomo.

La kato de prof. Lapenna



GRAMO DA EPIGRAMO

Al la fervorulo

*Vi de l'ideo fidela servanto,
Post la pripenso respondu al mi:
Ĉu dank' al vi famiĝas esperanto,
Ĉu dank' al esperanto - vi?*

Manjo

*Tre malfeliĉa estas Manjo,
Jaroj ne preterpasas ŝin.
Antaŭ milit' ŝi havis dudek
Kaj nun jam - dudek kvin.*

Burokratio

*En tirkest sub K-/o/ litero,
Kio estas? Muso mem!
- Nu? - meditas oficisto -
Muso, kial ne sub /e/-M?*

Roman Dobrzyński

LA SOLVOJ

Jen la korektaj tradukoj de la latinaj maksimumoj publikitaj en K-to 3/68:

- Alea iacta est - la ludkuboj estas ĵetitaj.

Julius Caesar diris tiujn ĉi vortojn decidante en la 43-a jaro trapasi Rubikon, la liman riveron inter Italio kaj Antaŭalpa Galio; per tio komenciĝis la civila milito, en kiu Cezaro venkis Pompeon.

- Amicus tamquam alter ego - amiko kvazaŭ la alia mi.

(Cicero)

- Festina lente - rapidu malrapide.

(Octavianus Augustus)



- Primum non nocere - unue ne domagi

(La fundamenta principo de la medicinarto formulita de Hippokratates)

- Sine ira et studio - sen kolero kaj partieceo.

(Tacitus, substrekante objektivecon de sia verko)

Libropremion ricevis Sinjoro **Tomas Jansson** el Svedujo.



Kiom da trianguloj enhavas la maldekstra figuro kaj kiom da kvadratoj - la dekstra? La solvon sendu al la redakcio de „Kontakto”. Unu el la solvontoj ricevos libropremion.